


Svisa Esperanto-Societo informas

jaro 2013 numero 2-a: marto-junio 2013
dissendo je la 1-a de marto



Fotis Claude Gacond

Printempo invitas al promenado !

Tri artikoloj en la festolibro rilatas al dokumentado. Pri tiuj mi komentoj ĉi-sube.

« **La biblioteko de Prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912)** »

Reinhard Haupenthal

La artikolo de Reinhard Haupenthal dokumentas pri la historio de la biblioteko de Prelato Johann Martin Schleyer, ekde sia forpaso en 1912 ĝis nun – do, dum ĝuste jarcento. La tuta ĉeno de vendoj kaj aĉetoj estas skizita en klara diagramo. La aŭtoro mem estis maŝo el tiu ĉeno, tial li tre bone konas ĝin. El la artikolo rezultas, ke preskaŭ la tuta biblioteko de Schleyer troviĝas nun en kvar bibliotekoj: en la germanaj urboj München (ĉe Bavara Ŝtata Biblioteko) kaj Lauda-Königshofen (ĉe Hejm-Landa Muzeo), en Aŭstrio (ĉe Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno) kaj en la svisa urbo La Chaux-de-Fonds (ĉe la biblioteko de CDELI, kie la repondeculo estas Claude Gacond). La celo de la artikolo estas atentigi pri tio, ke ekzistas ankaŭ kelkaj materialoj el tiu fonduso, ankoraŭ neakiritaj de ajna publika biblioteko, kaj indus ke tiuj materialoj jam estu akiritaj, por la uzo de esploristoj.

« **La planlingva kolekto de Ramon Molera (1922-1983)** »

Ana María Molera

La aŭtorino estas la filino de la forpasinta Ramon Molera Pedrals, grava kataluna esperantisto kaj libro-kolektanto. Tiu fondis la librokolekton, kiu iom post iom pligrandiĝis kaj aliformiĝis en privatan bibliotekon por publika servo. Ana María

Molera riĉigas la dokumentan materialon per mallonga sed emociiga biografio pri sia patro, kune kun ties foto. Priskribante la historion de la biblioteko, la aŭtorino rakontas amuzan okazaĵon pri la nekutima memoro de sia patro: « La katalogado de la revuoj estis en lia memoro. En aprilo 1971 li suferis aŭtomobilan akcidenton. Tuj kiam mi alvenis al la hospitalo li diris: « Ne timu, trankviliĝu, mi fartas bone, vidu, de *La Suno Hispana* mankas n-ro: 68, 69, 89, 90. *Heroldo de Esperanto* estas kompleta. *Esperanto Triumfonta* de la jaro 1920 mankas 2, 5, 6... ». »

« **La inkunabloj de Esperanto** »

Adolf Schmidt

Tiu ĉi artikolo estas tre speciala: ĝi estis publikigita unuafoje en 1931, do ĝi okdekjariĝis kune kun la jubileulo! Ĝi aperis tiutempe en la revuo *Zentralblatt für Bibliothekswesen* (Centra revuo por bibliotekaj aferoj) en Leipzig. Ĝia aŭtoro, Adolf Schmidt, apartenis al la generacio de Zamenhof (li vivis inter 1860 kaj 1944). La artikolo estas unu el la du tradukaĵoj en la libro, kaj elgermanigis ĝin Annakris Szimkat. Danke al ties traduko, Schmidt fariĝis unu el la 24 kontribuantoj al la libro. La aŭtoro komentas pri la unuaj libroj en Esperanto, kiuj eldoniĝis dum la 19a jarcento. Laŭ Schmidt, tiuj libroj fariĝis jam raraĵoj en 1931, kaj ilia konservado devis iĝi objekto de intereso por bibliotekoj. Nun, pluraj el ili troviĝas en la biblioteko de CDELI.